

2006年延时发生(笑话) PDF转换可能丢失图片或格式, 建议阅读原文

https://www.100test.com/kao_ti2020/148/2021_2022_2006_E5_B9_B4_E5_BB_B6_c105_148538.htm

Foje en brazila teatro mi devis interkonsenti kun japano pri detaloj koncerne rekvizitojn k.s. Por tion realigi, mi estis devigata paroli en Esperanto al brazilano, kiu ripetis mian diron portugale al japano scipovanta tiun lingvon, kiu ripetis ĝin japane al mia alparolato. Tiu siavice devis respondi laŭ la sama vojo. Kvar homoj necesis, por ke du el ili interkompreniĝu! Tia longa vojo estas neniel maloftaĵo. Laŭ Ben Patterson, angla membro de la Eŭropa Parlamento: "Supozu, ke temas pri itala parolanto. Nu, tre malmultaj interpretistoj kapablas trudi rekte el la itala en la danan. Tio okazas stafete. Do, la italo diras spritaĵon, kaj ĉiuj italoj ridas. poste ĝi tradukiĝas en la francan, kaj la francoj ridas. poste en la anglan, kaj la angloj ridas. Poste, ĉirkaŭ 30 sekundojn post kiam la italo parolis -- kaj li intertempe davigis, parolante pri la morto de kara amiko -- ĉiuj danoj ekridadas kvazaŭ freneze". -- William Auld 摘自La fenomeno Esperanto

100Test 下载频道开通, 各类考试题目直接下载。详细请访问 www.100test.com